

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“

Abonon ni akceptas ne por fiksa tempo (jaro, monato) sed por nombro de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerpiĝo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komercio“ senpage por ET-abonantoj.

La prezo de unu numero estas por la landoj:

Aŭstra 1.80 Kr.	Ĉeĥosl. 1.90 Kr.	Hungara 80 Kr.	Litova 95 Cd.	Rumana 4 Leol
Belga 0.65 Fr.	Finna 1.30 Fmk.	Itala 0.80 Lr.	Nederl. 0.15 Hfl.	Rusa 200 Gmk.
Brita 3/4 Pc.	Franca 0.60 Fr.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.50 Kr.	Sveda 0.24 Kr.
Bulgara 4 Levul	Germana 600 Mk.	Jugosl. 2 Din.	Pola 400 Mk.	Svisa 0.50 Fr.
Dana 0.30 Kr.	Hispana 0.30 Pes.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.60 Esk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Estonoj kaj latvoj demandu la prezon de sia Abonejo. — Aliaj landoj pagu egalvaloron de 0.60 Fr. Pk. aŭ 1 stampitan Respond-Kuponon.

Por Adresanĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.  
Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm<sup>2</sup> 0.10 svizan frankon (aŭ ĉe antaŭpago 200 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komercio“ kaj specialaj numeroj speciala prezo.

**Eldonantaro:**  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, Barcelona  
H. Fischer, grandindustriisto, București (Rum.)  
Teo Jung, Köln (Koloniaj)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

**Administrejo:**  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtekonto Köln 7065, por Teo Jung, Horrem.

**Redakcio:**  
Ĉefredaktoro: Teo Jung.  
Literatura rd.: Zanoni.

ET  
kostus malpli, se ĝi havus same multe da abonantoj kaj anoncoj kiel ĉiutaga gazeto.

N-o 125 :: Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 25. II. 23.

## Spertoj de Foiroj pri Esperanto.

Du ministroj akceptas honoran prezidon de Esperanta kongreso.

### La peresperanta reklamo de Finlanda Foiro dum tri jaroj.

Dum kelkaj jaroj certaj foiroj pli aŭ malpli uzis Esperanton en sia eksterlanda propagando. Plurnombra jam estas la dokumentaro, kiu pruvas la aprobron de tiuj gravaj institucioj. Ĉefe devas esti nomataj la Frankfurta, Leipziga, Reichenberga kaj Finnlanda foiroj, kies peresperanta propagando plej lasta aperis en formo tre impresa. Mi neniel malŝatas la presajn reklamilojn de aliaj foiroj, kiuj certaj pionire efektis al instigo de pli grandaj eldonaĵoj sur aliaj foiroj. Kompreneble ĉiu plia eldonaĵo estas instigo al aliaj eluzi la novan reklaman esprimilon, Esperanton. Sed por resumi la rezultojn de la peresperanta propagando de Finnlanda Foiro kaj ankaŭ por fari aldonon al la nun aktuala kolektado de dokumentoj pri la uzado de Esperanto en la komercista sfero por la konferenco en Venecio, oni permesu al mi filme rakonti pri la sukcesoj en sfero al mi bone konata.

Antaŭ la I-a Foiro 1919 la fondintoj de Finnlanda Foiro aranĝis katalogan ekspozicion por la publiko, siatempe tre multe vizitatan. Elektite de la Helsingforsa Esperantista Societo „La Poluŝtato“; la subprezidanto estis la ĉefredaktoro de la foiro, s-o L. Kuoppamäki, por peti permeson aldoni ankaŭ ekspozicion de katalogoj eldonitaj de diversaj firmoj en Esperanto. Nehezite la permeso estis ricevita kaj rezultigis, ke la katalogo de Esperantistoj estis aparte nomata en la gazetaj referatoj kiel la plej granda el ĉiuj grupoj. Ne mirige, ĉar la konservema helsingforsa Esperantistaro elmetis 200 sufiĉe luksajn presajojn.

Dum la foiro la helsingforsaj Esperantistoj havis la plezuron vidi, ke la foiro direktio invitis la eksterlandajn vizitantojn ankaŭ Esperante per invitelero, adresita interalie al diversaj registaroj.

De tiu tempo la opinio de la foiro direktoraro pli firmiĝis por Esperanto, kaj dum la foiro 1922 mi estis petata traduki aparian liston de komercistoj por la foiro katalogo.

Sed la jaro 1922 estis feliĉa ankaŭ en alia rilato. La pionira laboro de kelkaj Esp. foiristoj

estis rezultinta en tio, ke la Finnlanda Foiro estis oficiale petata flanko de la Praha Foiro inviti la II-an Internacian Konferencon de Foiroj kiel fakunvenon, de la XIV-a. Sekve invitelero estis dissendata al ĉiuj foiroj kaj komercaj ĉambroj, kaj poste sekvis ampleksa presita resumo pri faritaj iniciatoj flanko de diversaj foiroj por ĉies informo. Kompreneble ĉiuj el la invititoj ne povis ĉeesti pro la longa vojo, sed la Finnlanda Foiro havis la ĝojon gastigi la reprezentantojn de la plej gravaj foiroj en la mondo, nome Budapest, Frankfurt a. M., Leipzig, Malmö, Padova, Paris, Prag, Reichenberg, Valencia, Zagreb, ĉiu oficiale, kaj Basel, Barcelona, Göteborg, Lemberg kaj Lyon neoficiale. „Esperanto Triumfonta“ jam antaŭe informis pri la rezultoj de tiu teknika kunveno. La gazetoj de la kongresurbo en pluraj kaj longaj artikoloj pritraktis la signifon de tiu kunveno, ĉiuj el la reprezentitaj foiroj estis ofte nomataj, eĉ la foiro bankedo, kie oni en 29 paroladoj akcentis la signifon de la foiro kunlaboro sub signo de la lingvo internacia, do prezentinda reklamo! La poste dissenditaj specimnumeroj de la finnaj gazetoj estas en tiu rilato bona dokumentaro pri la fakto, ke la konferenco ĉiujure konvenanta ĉiam povas servi du celojn, tiun de la foiroj kaj tiun de la Esperantista movado.

Kaŭze de la Interfoira Konferenco la Finnlanda Foiro eldonis la broŝuron „La ekonomiaj fortoj en Finnlando“, kiu ĝi senpage disdonas en 5000 ekzempleroj. La multekosta eldonaĵo povas pli ol pruvu la taŭgecon de la peresperanta reklamo kaj ĉefe taŭgecon de la lingvo mem por la sendube serioza propagando. La libro estis jam menciata en pluraj eksterlandaj gazetoj, el kiuj mi ĝis nun ricevis la gazetojn Edinburgh Evening News, Journal de Genève, Herald de San Fernando, Journal of the Edinburgh and Leith Chamber of Commerce, Finanzas y Tributos, Frankfurter Messzeitung, Esslinger Zeitung, Die Rote Fahne, Slovenský Denník, De Zoom, Gazette van Gent, Informfolio de la komerca kaj industria ĉambro de Torino, kaj el la Esperantistaj gazetoj Esperanto Triumfonta, Esperanto-Praktiko, La Marto, Aŭstra Esperanto Raporto, Esperanta Finn-

lando. Sed multe pli granda estas la nombro de la menciintoj, nur kore mi ilin petas por la celo ĉi sube nomata. Sur la bazo de tiu geografia libreto okazis pluraj paroladoj, kaj ĝi sciata servis kiel prezentilo en la poresperanta propagando inter la komercistoj en diversaj landoj. Pri tio ĉiu ajn povas sin konvinki per la okazinta korespondo inter eksterlandaj komercistoj-industriistoj kaj Finnlanda Foiro. Interalie certa eksterlanda financa societo volas investi kelkajn milionojn da anglaj pundoj en Finnlando kaj portio deziras agenton.

Dum traĝgado de la korespondo oni precipe atentis, ke pluraj adeptoj de Esperanto jam laboras en la komerca sfero, ke oni ofte aludas al anoncoj aperintaj en la Esperantistaj gazetoj; sed kio ankaŭ havas propagandon sencon estas tio, ke pluraj nacilingvaj demandoj sin bazas sur informoj de diverslandaj naciaj gazetoj. Tute mi ne trovis en la korespondo t. n. „nolvajojn“, kiuj ne celus interesojn de la komerca sfero laŭcela.

Ankoraŭ la Finnlanda Foiro dissendis duonmilionon da seslingvaj prospektoj kun teksto en angla, franca, germana, Esperanta, sveda kaj finna lingvoj.

Antaŭ kelkaj tagoj Finnlanda Foiro en Esperanto dissendis al ĉiuj foiroj leteron pri detala organizo de la komuna laboro en la reklamo kaj tian kaŭze de proponoj flanko de eksterlandaj foiroj. Ĝi do akceptas la ĉefreprezentantecon de ĉiutandaj foiroj en Finnlando.

La seslingva katalogo de Finnlanda Foiro por la jaro 1923 enhavas jam kutime Esperantan parton kun resumo pri la peresperanta propagando.

Finfine, la peresperanta reklamo de Finnlanda Foiro estas ekspozita dum la foiro semajno la 1.-6. julio 1923. Do, samideanoj, menciigu la notojn, kiuj sekvas la „Esperantan publikacion n-o 1 de Finnlanda Foiro“ en plej eble multaj naciaj gazetoj, ju pli vaste des pli bone, kaj ĉiam sendu la specimnumerojn por la ekspozicio de la peresperanta propagando de Finnlanda Foiro. Volu ligi Esperanton en la interesoj de Finnlanda komercistaro.

Konrad Ojala  
ofice  
Esperanta Sekretario de Finnlanda Foiro.

### Foiro de Reichenberg kaj Esperanto.

La foiro direktio respondis oficialan demandon pri „Esperanto kaj la foiro“ jene:

La foiro de Reichenberg enkondukis oficiale Esperanton jam okaze de la unua foiro en la jaro 1920 kaj uzas ĝin kiel la naciajn lingvojn por la korespondado kun eksterlandanoj kaj por la varbado de aĉetantoj kaj ekspozantoj. La foiro eldonas por ĉiuj foiroj varbilojn kaj propagandilojn ankaŭ en Esperanto, same Esperantaj afiŝoj estas dissendataj.

La foiro starigis oficialan Esperanto-Fakon. La varbado per Esperanto ĉiam estas tre kontentiga. Longaj raportoj de eksterlandaj gazetoj kaj leteroj el diversaj landoj, kiuj mencias la Esperantan varbilon, montris la sukcesan varbadon per Esperanto. Sed ankaŭ kiel korespondanta lingvo Esperanto jam estas ofte uzata, kion spertas la „Komerca kaj Trafika Fakto“ („Handels- und Verkehrsabteilung der Reichenberger Messe“), kiu peras komercajn interrilatojn dum la tuta jaro inter enlandaj produktistoj kaj eksterlandaj aĉetistoj, ricevante krom leteroj en la naciaj lingvoj ankaŭ tiajn en Esperanto. Ofte firmoj postulas la respondon en sia gepatra lingvo aŭ en Esperanto. Firmoj lere instigas la enkondukon de la Esp. korespondado en la internacian komercion. Demandoj de firmoj, rilate la uzeblecon de Esperanto kiel internacia korespondanta lingvo, estas respondataj ĉiam en rekomenda senco.

Dum la foiro semajno estas oficiala Esperanta informejo kontraŭ la stacidomo. Rendevejo de eksterlandaj Esperantistoj en la foiro oficejo.

Anoj de la Esperantista grupo disponigas sin kiel gvidantojn al la eksterlandaj Esperantistoj.

### La Brazilia Registaro kaj Esperanto.

S-oj D-ro Felix Pacheco, Ministro de l' Eksterlandaj Aferoj, kaj D-ro João Luiz Alcos, Ministro de l' Internaj Aferoj, akceptis la titolon de Honora Prezidanto de la Sepa Brazilia Kongreso de Esperanto en Rio de Janeiro, de la 9-a ĝis la 14-a de marto 1923.

### Jozefa.

Rakonto, verkita en la jaro 1824 de St. St. Blicher.  
Tradukis el la dana lingvo:  
H. J. Bulthuis, L. K.

III.

#### La balo.

La aŭtuno kaj la vintro venis kune kaj batalis pri la supereco; tio signifas: estis je la fino de l' monato Novembro, kiam neĝo, haĵo, pluvo, ventego kaj nebulo vete konkuris por moligi la teron kaj mallumigi ĉielon kaj humoron. Mia terkulturo estis organizita, ĉef-administranto estis nomita, amerikaj plugiloj, draŝmaŝinoj, svisaj bovinoj, hispanaj ŝafoj ktp. estis aĉetitaj; la farmodomo estis riparita kaj bele pentrita ekstere kaj interne; modernaj kandelabroj kaj lampoj, kanapoj, litoj kun baldakenoj kaj belaj pentraĵoj ornamis la nove kalkumitajn ĉambrojn — malmultvorte: mankis nenio krom edzino.

Sed mi forte decidis edziĝi kun neniu krom mia belulino de la stepo, kiun mi ne estis forgesinta dum la tri monatoj, kiuj pasis, kvankam de tempo al tempo mi preskaŭ rigardis la tutan aventuron kiel aer-fenomenon kaj ŝin kiel belan meteoron.

Por distri min tomete kaj pligajigi mian spiriton en la malluma vetero kaj por dece konatiĝi kun la loĝantoj el ĉirkaŭaĵo de du mejloj pere de mia administranto, kiu bone konis ĉiujn, mi invitis ilin al balo.

La vespero venis kaj unu veturilo post alia kun sinjoroj kaj sinjorinoj ruliĝis en la bienkorton. En la vestiblo kun la marmoraj kaheloj mi, vestita per mia rusa husaruniformo kaj ornamita per miaj ordenoj, akceptis ilin tre elegante. Tie mi

rekonis multajn geamikojn el mia juneco, multajn novajn vizaĝojn, sed neniu estis kapabla ŝanĝi la baton de mia pulso.

Tuj post kiam la gesinjoroj estis alivestitaj kaj balornamitaj kaj la administranto certigis min, ke ĉiuj, kiuj promesis veni, estis venintaj, mi malfervis la balon per muziko de tri blov-kaj kordinstrumentoj el la plej proksima urbo. Mi estis dancinta la kvadrilon kun ĉiuj paroj kun escepto de la lasta, kaj ne atente rigardante la sinjorinojn, eĉ ne rimarkinte, ke la laste veninta paro proksimiĝas al mi. Dum mi etendis mian manon al la sinjorino por turni min kun ŝi, subite miaj okuloj trafis ŝian vizaĝon — ŝo Amoro! ho estro de la diaj kaj homaj koroj! — tio estis ŝi! se min estus tuŝinta tremangilo, ne pli terura elektra fluo estus trakurinta min. Post la emocio sekvis tremo, sed ĉu tion kaŭzis mia mano aŭ ŝia, mi ne scias ankoraŭ; verŝajne ambaŭ niaj manoj ĝin kaŭzis.

Kiam nia dancvico finiĝis, mi diris: „Ni ne disiru nun, kiel ni disiris la lastan fojon.“

„Tio okazis ĉe la brulado, mi supozas!“ ŝi respondis rugiĝante.

„Ĉu vi scias, ke ĝi brulas ankoraŭ nun?“ mi demandis.

„Ho!“ ŝi diris serioze, „tio certe estas elia brulado, kiu komenciĝas facile en la stepo.“

„Sed estingiĝas malfacile,“ mi interrompis.

„Ofte ĝi estingiĝas per si mem,“ ŝi daŭrigis malrapide.

„Ne ĉi tiun fojon!“ mi diris kun eksciteco, invitante ŝin al dancado.

Kial ripetis la am-sensencojn de tiu nokto? Je la mateno mi estis enamiĝinta ĝis super la oreloj, kaj la sekvantan posttagmezon mi veturis en la korton de sinjoro N..., por informiĝi pri la sanstato de lia bela filino. Bonaj aferoj ne

devas esti prokrastataj kaj tial mi ripetis mian viziton, komence ĉiun duan tagon kaj poste ĉiutage, ĝis kiam fine mia amata Jozefa tre okaze falis sur mian bruston kaj konfesis al mi sian amon. Senprokraste mi serĉis ŝian patron kaj petis de li la manon de lia aminda filino.

„El mia tuta koro,“ li respondis, „mi konfidas al vi la knabino; sed — antaŭe unu vorton: ŝi ne estas... mia filino! Kvankam mi ŝin amas tiel kore, kvazaŭ ŝi estus tia.“

„Kiel?“ mi ekkriis, „kies filino ŝi do estas?“

„Ĉu vi tamen deziras havi ŝin?“ li demandis. „Eĉ se ŝi estus la filino de la noktogardisto en H...“ mi respondis, „ŝi estu mia edzino!“

„Nu! Mi klarigos al vi ŝian devenon; sed tio restos sekreto inter ni ambaŭ — ĉama sekreto. Ŝi mem scias nenion pri tio kaj ne devas scii tion, ĉar ĝi povus esti por ŝi sencela mantrankvilito por ŝia kvileto. Vi ja memoras la tempon, kiam la hispanoj estis tie ĉi?“

„Jes, tre bone!“

„Kaj ke al la alivestita majoredzino naskiĝis malviva infano en K... d?“

„Jes, jes!“

„Nu: la akuŝistino, kiu konsentis revivigi la infanon, sed ne havis ĉe si la necesajn aparatojn, prenis ĝin hejmen, kaj post kelkhoraj seninterrompaj klopodoj fine sukcesis eligi la unuajn elspirojn kaj poste tute revivigis la infanon; sed ĉar ĝi estis tre malforta kaj ĉar ŝi timis, ke ĝi tamen mortos, ŝi ne intencis antaŭtempe feliĉigi la gepatrojn per la rezulto de siaj klopodoj, sed atendis ĝis kiam ŝi povos redoni la infanon freŝa kaj sen mortdangero. Fine tio estis ebla al ŝi kaj unu mateno jam frue ŝi rapidis al la bieno por surprizi la gepatrojn per tiu ĝojiga novaĵo. Sed... ili estis vojaĝintaj for la antaŭan vesperon. Ektimigite ŝi kaŝis la reviviĝon de la infano al

siaj gepatroj kaj rapidis hejmen por pripensi kion fari. Ĝuste en tiu tempo ŝi estis vokata al mia edzino, kiu post malfacila akuŝado naskis vere mortintan infanon. Subite ekpenco kiel fulmo kuris la animon de la akuŝistino. Ŝi proponis al mi akcepti la infanon de la forvojaĝintaj hispanoj kiel mian kaj lastan mian edzinon nesclanta pri tiu bonintenca trompo. Kaj tiel okazis: en la vespero ŝia edzo — la sola persono, kiu estis kunsclanta de la sekreto — alportis la kompatindan hispanan infanon, prenis kun ŝi mian mortintan kaj lasis ĝin enterigi. La malgranda forlasita krelitaĵo estis metita sur la bruston de mia edzino. Ŝi vivis kun ŝi dekdu jarojn. Kredante, ke la knabino estas la ŝia.“

„Tre mirinde!“ mi ekkriis. „Sed, pardonu! Ĉu vi neniam penis konduki la knabinojn al ŝiaj veraj gepatroj?“

„Tion mi certe penis,“ li respondis; „kvankam sincere dirite, mi ĝin penis kun timo trovi ilin, ĉar en tia okazo mi devus ĉagreni mian edzinon pli multe ol mi komence ĝoigi ŝin. Multajn fojojn mi skribis al bofrato en Barcelono, sed li sciigis min, ke la majoro kaj la supozita kadeto verŝajne estis mortigitaj en batalo kontraŭ la francoj, kie preskaŭ la tuta regimento El Rey estis neniigita.“

„Sed la nomo Jozefa?“

„Tiel nomigis mia bofratino, kiu vivas ankoraŭ en Kopenhago, kaj ĉe kiu mia adoptita knabino estis la lastajn jarojn, kaj de kiu mi kondukis ŝin en tiu somero, kiam ni renkontis unu la alian ĉe la stepobrulado.“

Kortuŝite mi iris returne al Jozefa; ŝi flugis al mia brusto kaj flustris: „Ĉu mi estas via?“

„Jes, vi estas mia!“ mi diris, forkonante la ĝojplorojn de sur ŝiaj belaj vangoj; „vi estas mia, kaj sole mia!“

# Pri Esp. gazeto por infanoj.

La artikolo pri tiu temo en ET n-o 120 vekis nur malgrandan eĥon. Ni ricevis du alskribaĵojn de germanaj pedagogoj, kies unu rekomendas ĉiuforte disvastigi la jam ekzistantan „Esperantista Junularo“ (eldonanto: A. Robin, Baugé, Maine-et-Loire, Francujo), kiu jam havas laŭtakse 600—700 abonantojn. La gazeto estas la organo de Universala Esp. Asocio Junulara, al kiu estas anigita la franca, belga kaj germana asocio de junaj Esperantistoj. La skribinto diras, ke la gazeto ankoraŭ havas mankojn, precipe galicismojn, kiuj tamen estus eviteblaj. La skribinto opinias, ke estus preferinde eldoni la gazeton en malbonvaluta lando kaj proponas eventualan kunigon kun ET. La alia alskribaĵo jam pritraktas la eldonon de nova gazeto por infanoj.

Se estas permesate esprimi nian propran opinionon, ni diras la jenon:

Ni opinias same kiel la verkinto de la artikolo en n-o 120, ke la plano de „ampleksa, bele aspektanta, ne multekosta, sed precipe bone redaktata, bele kaj riĉe ilustrata, riĉenhava, interesa ktp.“ gazeto por infanoj „multe superas nian hodiaŭan forton“, eĉ se la gazeto aperus en malbonvaluta lando kaj estus finance subtenata de malavara infanamiko. Cetere, ankaŭ en malbonvalutaj landoj la prezoj iom post iom konformiĝas al la prezoj en bonvalutaj landoj. Se ET aranĝas la aferon, ĝi povus pleje liveri 8-paĝan monatan revuon, kaj tiun revuon povus legi nur tiuj infanoj, kies patro aŭ patrino estus abonanto de la tuta ET; sed ofte lernas Esperanton infanoj de gepatroj, kiuj mem ne lernis ĝin. Ni opinias preferinde, se la eldono de gazeto por infanoj jam estus ebla, eldoni ĝin aparte. Eble „Esperantista Junularo“ povos konformigi sian enhavon kaj amplekson al la deziroj de la iniciatintoj por nova porinfana gazeto. Ni atentigas ankoraŭ, ke „British Esperantist“ havas regulan porinfanan aldonon, kvankam malgrandan.

Kompreneble, ankaŭ ET povos havi, sub iuj cirkonstancoj, specialan rubrikon por infanoj, aŭ eldoni apartan porinfanan gazeton; sed ĉu ĝi povos esti „ampleksa, bele aspektanta, ne multekosta, riĉe ilustrata ktp.“, pri tio ni multe dubas. Ni konsilas, trankvile pripensi la aferon kaj ne trouĝigi ĝin. *ET.*

## Vegetarismo.

### IV-a Internacia Vegetara Kongreso

okazos en Stockholm, Svedujo, dum Pentekosto, 19.—21. majo 1923.

Samtempe la Sveda Vegetara Asocio festos sian 20-jaran ekzistadon.

Delegitoj por vegetaraj organizaĵoj en pluraj landoj sin jam anoncis.

Kiu deziras tajn sciligojn, skribu en Esperanto al s-o redaktoro J. L. Saxon, Lästmakargatan 12, Stockholm, C.

Esperantistaj vegetaranoj, kiuj intencas partopreni, komuniku pri tio la delegiton de UEA en Stockholm, s-on Henning Halldor, Helsingegatan 9, Stockholm, Va.

## Mallongaj Esp. Scilgoj.

### Rumanujo.

Kun plezuro ni komunikas al la samideanaro tutmonda, ke la kunglita fortoj de la rumanlandaj samideanoj sukcese kreis organizan kaj administran centron por la landa movado. Estas fondita Esperanto-Centro Rumana sub la gvidado de s-oj Henriko Fischer, Lingvo-Komitadano, I. Giuglea, del. de UEA, kaj Andreo Ce, sekretario de RES, kun la celo direkti kaj administri

### IV.

#### La edziĝa festo.

La geedziĝo estis finita. Ni staris ankoraŭ ĉe la edziĝa benketo kaj ricevis la bondezirojn de la ĉeestantoj. Belege ruĝiĝis mia kara fianĉino, interne tuŝita en sia amoplena koro.

Per kvietaj amikeco ŝi dankis la gratulintajn amikojn kaj amikinojn — ŝi ridetis, por tiel diri, tra larmoj. Kiam ŝi ĉirkaŭbrakis sian adoptopatron kaj preskaŭ plorante premis lin al sia brusto, liaj kaj miaj okuloj pleniĝis je larmoj.

„Patro kaj patrino forlasos vin, estas skribite, — post tiuj vortoj larmoj sukoks iliajn vortojn, kaj kortuŝite li sin jetis sur mian kolon. Mi komprenis lin, sed pro emocio povis respondi nenion. En mia senparola animo ripetigis la solena juro: fidele, sankte, eterne ami tiun senpatran anĝelon.

Fine la ceremonio finiĝis kaj la profundaj, gravaj sentoj cedis al pli malpezaj ĝojoj. La multnombra societo miksiĝis, disiriĝis en la vasta de kandelabroj hele lumigita salono, kaj baldaŭ oni aŭdis nur ĝeneralajn babiladon, ŝercojn kaj ridojn. Refoje kaj refoje mi estis gratulata jen de unu jen de alia; sed miaj okuloj sekvis senĉese mian belan edzinon, kiu ŝvebmoviĝis inter la ceteraj sinjorinoj kiel la luno inter la nuboj.

Horo pasis tiel, kiam mia bopatro venis al mi sciligante, ke malsupre en la loĝocambro estas du vojaĝantoj, kiuj perdis la vojon sur la stepo; li ne povis kompreni ilin, ĉar ili parolas strange kripligitan germanan kaj alian lingvon, kiun li ne konas. Ĉar ili estas bone vestitaj kaj pruvis per sia tuta eksterajo, ke ili estas civilizitaj homoj, li deziris, ke ili aliĝu al la societo kaj tial petis min iri malsupren por paroli kun ili. Samtempe unu el la pasiroj venis kaj rakontis, ke ili estas

la iutlandan propagandon, aranĝi kursojn, disveĝi librojn, peri la abonojn por Esp. gazetoj kaj ĉiunmaniere servi la interesojn de la movado.

Por vivteni tiun gravan organon de la movado, estas fondita Protekta Komitato de la Rumanlanda Esperanto-Movado, kies membroj morale kaj materiale subtenas la Centron, pagante laŭvolan kotizon monatan. La subskribitaj monataj kotizoj de la ĝis nun aliĝintaj protektantoj varias inter 20 kaj 500 leoj.

Sur la listo de la protektantoj troviĝas la ĵus fondita „Espero“, Societo por Perado kaj Negoco, transdononta tutan sian negocan gajnon al la Protekta Komitato por la movado. Ĝiaj fondintoj kaj gvidantoj estas s-oj H. Fischer kaj Ernst Grund videl. de UEA. Adreso de la supre menciitaj organizaĵoj estas: Bucuresti, Alea Suter 19.

Samtempe estis organizata Informejo kaj Librovendejo en la librejo Bibliofila (Bucuresti, str. C. A. Rosetti 2., palaco de Fundatiunea Universitara Carol, centre de l'urbo) por provizi per informoj kaj necesaj lerniloj la interesigantojn kaj travojaĝantaj samideanojn.

Rumanlanda Esperantista Societo (RES), reorganizita en la pasintsomera II-a Rumanlanda Esp. Kongreso en Cluj, baldaŭ ekfunkcios. Ĝia dumkongrese elektita komitato nun prilaboras la novajn statutproponojn kaj organizaĵajn planojn. Adreso de la sekretarioj: Bucuresti, Alea Suter 19.

Varme dankante al la ĝis nun helpintoj kaj dissendante niajn tulkorajn bondezirojn ni insiste petas la samideanaron por plua efika kunlaboro kaj ni speciale atentigas la rumanlandan ŝatatan samideanaron pri tio, ke por ĉiu informo, konsilo, helpo, lerniloj, literaturaĵoj, abonoj k. a. oni sin bonvole turnu al la adresoj supre indikitaj.

### Germanujo.

En Dresden la 31. jan, pli ol 900 Esp. infanoj povis dank' al grandanima monhelpo de s-o G. van Heek, Nederlando, kaj s-ino Mammen, Danujo, ĉeesti prezentadon de la cirko Sarrasani. Tre efike propagandis la infanoj per flagoj kaj verdaj steloj.

En Freiberg 26. marto okazos delegitara kunveno de la Saksa Instruista Unuiĝo.

En Striegau du kursoj por progresintoj kaj komencantoj.

En Weissenfels kurso de s-o E. Schwarzkopf-Merseburg. Instigita per s-o A. Schwarzkopf la magistrato nun transdonis senpage cambron por la kurso en la supera reallernejo.

En Plauen jarkunveno de la loka grupo. Ĉiusemajne ekzercal vesperoj. Ĉiunonate Esp. parolado en la grupo kun diskutoj en Esperanto.

### Saksa lando (Germanujo).

Brand-E.: 2 novaj kursoj; vintra festo kun dancado.

Freiberg, Sa.: 2 novaj kursoj; vintra festo kun paroladoj de s-o Glöckner pri Zamenhof kaj de hungara s-ano Klein pri la hungara poeto Petöfi.

Oederan: Nova kurso kaj fondiĝo de dua grupo. Lumbild-parolado de s-o Weltzmann pri la urbo de la XV-a.

### Hispanujo.

En Barcelona la sidejo de la „Barcelona Esperanta Societo“ estas Baix de Sant Pere 5, tiu de la „Barcelona Stelo“ Marqués del Duero 101.

### Argentino.

En Buenos Aires fondiĝis nova grupo „Patrujo kaj Amo“. Fervore propagandas s-oj Gold, Scaramuzza, Di Rocco, Pionentino kaj aliaj.

### Svedujo.

En Malmö la klubo Esperantista aranĝis 24. jan. en salonego de la popoldomo publikan propagandan kunvenon. Parolado de s-o J.

franco, kiuj, ekzilitaj el sia patrujo pro politikaj ideoj, volis serĉi novan hejmon en la nova mondo, sed forpeltite de longedaŭra ventego estis jetitaj sur la iutlandan marbordon. Nun ili estas vojaĝantoj al Kopenhago, de kie ili intencas ŝipiri Amerikon; post lia invito ili nun aliĝos al la societo.

Dirinte tion, ili eniris la salomon — unu estis altkreska, mezaĝa viro, la alia bela junulo kun pala melankolia vizaĝo. Gracie ili salutis ĉiun flanken kaj la pastro kaj mi — la solaj, kiuj povis kompreni ilin — iris renkonte al ili kaj komencis konversacion en la franca lingvo, por eldiri nian bedaŭron pro ilia malĝojiga akcidento.

La pli aĝa, al kiu mi estis turninta min, parolis sufiĉe bone, kvankam iom ĝene kaj kun peza akcento. Mi konjektis el tio, ke li ne estas franco, sed sud-eŭropano, kaj demandis: ĉu li preferu parolas itale aŭ hispane?

Vane mi atendis la respondon; li ne estis aŭdinta, kion mi diris; liaj okuloj kontraŭe estis fikse direktitaj al objekto post mi, kaj ruĝo kaj morta palo alternis sur lia vizaĝo. Mi turnis la kapon — estis mia fianĉino, kiun li rigardadis.

Sammomente ŝi estis vidata de l' alia fremdulo, kiu kun li ekkriis: „Giesu Maria!“, paliĝis, ŝanceliĝis kaj ekkaptis la brakon de sia samvojaĝanto.

„Ĉu vi parolas hispane?“ demandis ĉi tiu per malforta kaj tremetanta voĉo.

Mi jesis.

„Kiu estas tiu bela sinjorino?“ li diris plue.

„Jus ŝi fariĝis mia edzino!“ mi respondis.

„Pardonu, sinjoro!“ li diris, „la ekvido de via fianĉino nepre frapis nin; ĉu vi mem ne konstatas eksterordinaran simlecon inter ŝi kaj mia frato?“

Petersson, muzikaj deklamaĵoj kaj kantoj de vira horo, parolado de s-o L. Jönsson pri „la eblecoj solvi la mondlingvan demandon“, parolado de s-o E. Andersson pri impresoj kaj spertoj dum vojaĝo tra Germanujo, Belgujo kaj Francujo. Ĉeestiis ĉ. 150 personoj, el kiuj 30 anoncis sin por Esp. kurso de s-o J. Petersson. *E. A.*

### Francujo.

En Le Mans parolado de s-o Le Bihan pri Finnlando kaj la XIV-a kun lumbildoj. Favoraj raportoj en la gazetaro.

En Clermont-Ferrand propaganda vespero de la loka grupo.

En Alger kurso por skoltoj de s-o Couyon. En Villeneuve-St. Georges parolado de prof. Decourt en la katolika unuiĝo de fervojistoj. Kurso.

En Perpignan la grupo preparas por la 17. marto koncertbalon kun konkurso de „L'Union Espagnole“ kaj „La Verda Kato“. Nova Esp. kurso ĉiusemajne en „Katolika Juneco“.

En Clermont la Esp. grupo „Konkordo“ vigle propagandas, havante nun 60 anojn. Kelkaj veturos al Nürnberg.

En Béziers (Hérault) elementa kaj supera kurso de s-o Rolento en ĉambro de la urbdomo, elementa kurso de s-o Floites.

### Hungarujo.

En Budapest propaganda parolado de s-o Balkányi pri la evoluo de la mondlingvoj en la Socia Muzeo.

### Italujo.

En Lecce kurso de D-ro Vito de Benedetto ĉe loka reĝa teknika lernejo kun pli ol 50 partoprenantoj. La kotizoj por la kurso estas destinitaj por la lokaj institucioj de la georfjoj de milito. Nova kurso por fervojistoj.

### Jugoslavujo.

En Sušak kaj Reka la movado post la oficiala aprobo de la registaro vigligas. Fervore propagandas s-oj Lipič, Hirs, Šikič. En la jara kunveno oni decidis partopreni en la I-a jugoslava kongreso okazonta en junio 1923.

### Nederlando.

En Wormerveer parolado de s-o Chr. Kamper el Nieuwe-Niedorp en la loka societo pri travivaĵoj dum la XIV-a en Helsinkl.

### Belgujo.

En Berhemo estis starigita „Belga Federacio de Laboristoj Esperantistoj“. La federacio precipe celas enkonduki Esperanton en la laboristaron kaj internaciajn kongresojn.

### Ĉeĥoslovaka Respubliko.

En Altrouhau fondiĝis Esp. unuiĝo la 15. nov. 1922.

En Meierhöfen apud Karlsbad okazis la 2. dec. bonfara aranĝaĵo de la Esp. unuiĝo; rezulto 1500 Kč. por kristnaskaj donacoj al infanoj. (Mallongigita pro malfruigo.)

### Stranga afero.

S-o F. G. Isella en Lugano, Svizl., del. de UEA, skribas al ni:

... mi legas en ET n-o 119, 3-a paĝo, artikolon titolitan: „Hispana-Pola-Esperanta Kolonio“, redaktitan de s-o Schwaiger, del. de UEA en Berlin-Steglitz. Mi volus demandi al tiu sinjoro, ĉu li konas s-on J. T. M., pri kiu li skribas kiel mi scias, s-o J. T. M. nek estis en Zürich nek konas la delegiton de Zürich. Mi serĉis Esperantistojn lin, mi akompanis lin al Helsinkl pri la „Hispana-Pola-Esperanta Kolonio“ mi skribas kun demandsigno.

Bonvolu... publikigi... ĉar la Esperantistoj devas esti informataj nur pri la vero.

Al tio ni aldonas, ke — ricevinte la raporton de s-o Schwaiger — ni ankaŭ dubis pri la afero kaj esprimis al s-o Schw. nian suspekton, ke la „kolonio“ eble fariĝos dua „Parkuro Esperanto“. Sed ĉar s-o Schw. certigis nin pri nepra fidindeco de s-o J. Tor M., ni publikigis la artikolon. La respondecon pri ĝi ni tamen devas lasi al s-o Schw.

Mi rigardis unu kaj alian, komparis ilin kaj nun estis mia vico lasi ilian demandon nerespondita. Refoje mi jetis mian rigardon sur la vizaĝon de la pli aĝa kaj kvazaŭ fulmo trakis mian animon.

„Vi nomiĝas G...a, kaj vi Jozefa?“ mi ekkriis.

„Ho mia Dio, jes!“ respondis la pli aĝa.

„Tiam — tiam —“ mi diris plue, sed subligite de miaj sentoj mi ne povis eligi unu vorton plu, sed jetis min sur la kolon de la majoro.

„Mia patro!“ mi flustris, kaj larmoj sensarĝigis mian koron.

„Mia patrino!“ mi plordiris kaj ĉirkaŭbrakis Jozefan. „Mi estas Antonio, kaj tio estas via filino!“

La tuta surprizita societo estis ĉirkaŭinta nin kaj atendis kun streĉita scivolo la solvon de tiu ŝajne neklarigebla enigmo. Mia bopatro — kia li dum kelkaj horoj estis estinta *perprocurationem* — unua komprenis la rilaton, kondukis la fianĉinon al ni kaj ekkriis iom senpripense:

„Rigardu, jen vi havas viajn gepatrojn!“

Konfuzite pro tiu plena nekomprenejo ŝi kontraŭbatalis, sed Jozefa ellasis min, ĉirkaŭbrakis ŝin kaj premis ŝin al sia koro. La luna Jozefa, kiu vidis sin ĉirkaŭbrakita de nekonata viro, eligis ekkrion kaj volis liberigi sin. La patrino ellasis ŝin kaj ŝajnis dubi pri la vereco de tiu revido; sed poste ŝin ĉirkaŭbrakis la patro.

„Jozefa, amata Jozefa!“ mi ekkriis, „ili estas viaj gepatroj!“

Jen ŝi kuŝis sveninte en la brakoj de sia patro — la patrino falis en la miajn. Baldaŭ ili rekonsciĝis, kaj kvar feliĉaj homoj elverŝis stajn ĝojplenajn korojn por la ĉielo kaj por si respikro. Demandoj kaj respondoj, ekkrioj kaj karesoj miksis sin en la konfuzitan, ĝojplenan tumulton, kaj kiam

## La „Popola Universitato de Nasaryk“ en Mor. Ostrava (Ĉeĥoslovakujo)

intencas aranĝi pentekoste ekskurson al Holando. En Haag okazos dimanĉe 20. majo parolado pri ĉeĥoslovaka respubliko kun lumbildoj. Partoprenontoj-ĝelernantoj proksimume 40.

## Petu la „Devoj de la Homo“!

Ĉiu Esperantisto, kiu ankoraŭ ne ricevis ĉi tiun libreton, petu ĝin de la Laborista Esperanto-Grupo, Genova (Italujo), Casella Postale 922, sendante nedevige laŭvolan monoferon al la adreso de s-o Ettore Managlia, sekr.-kas. Tiu kiu jam ricevis la libreton, estas ĝentile petata sendi simplan poŝikarton aŭ leteron kun ricevatesto de la libreto. Ĉiu delegito de UEA estas afable petata sendi la precizan adresaron de sia loka UEA-anaro.

## Esperanto inter ukrainaj skoltaj.

La ĉefa estraro de ukrainaj skoltaj anaroj en Lwów (Polujo) esprimas en ampleksa letero al la redakcio de Ukraina Stelo sian aprobon kaj subtenon de Esperanto. Vidante ne nur praktikan sed speciale idean flankon de Esperanto, ĝi starigis specialan ekzamennon por tiu lingvo kaj la sukcesintoj rajtas porti specialan insignon kun verda stelo. Nur manko de fakaj edukistoj malhelpas ĝeneralan enkondukon de Esperanto inter ĉiuj grupoj.

## S-o P. P. Christensen, prezidanto de terlaborista partio kaj kandidato por la prezidanteco Usona

vizitis Japanujon. La 5. nov. matene komitatanoj de la Japana Esperanto-Instituto, Hasegawa, Mori, Hosaka kaj Oosaka faris viziton al li en Imperia Hotelo por lin honori. S-o Christensen estas vere fervora propagandisto. Interale li diris, ke li ne opinias, ke la angla lingvo fariĝos lingvo internacia, kaj ke dum sia vojaĝo en Eŭropo li estis ofte bonvenigata de Esperantistoj. Ĉe la bonveniga festeno aranĝita la antaŭan vesperon de Imperia Agrikultura Asocio li deklaris en sia dankosaluto sian bedaŭron, ke la gastigintoj ne scias Esperanton, ĉar alie li povus pli helpe sin esprimi en sia kara lingvo. La sekvintan tagon li forveturis al Vladivostok, kie li esperis ankaŭ renkonti samideanojn.

## Esperanto-sukeraĵoj en Pécs (Hungarujo).

La firmo Gruber & Böhm, Pécs, Kiraly u. 8, Hungarlando, fabrikas bombonojn en papero kun Esperanta stelo kaj frazo pri Esperanto. Kilogramo kostas sv. fr. 2.50. La sukeraĵoj faras bonan propagandon por Esperanto.

## La ĝenerala jara konferenco de la Nord-orienta Esperantista Federacio (Anglujo)

okazis 27. jan. en Newcastle-on-Tyne. La prezidanto de la loka Esperanto-Societo s-o A. R. Fairbairn bonvenigis la delegitojn en Newcastle, kaj responde donis reciprokajn salutojn s-o J. Lyndsay por la samideanoj de Darlington kaj Middlesborough, s-ino S. Dunn (Jarrow), s-o T. Daglish (Wallsend), s-o F. Sutcliffe (Gateshead). Laŭ raporto de la sekretario s-o J. H. Murray ekzistas grupoj aŭ kursoj en Bedlington, Coxlodge, Darlington, Gateshead, Jarrow, Middlesborough, Newcastle, Wallsend. Oni elektis kiel honoran prez. s-on Dr. R. W. Simpson, kiel prez. s-on F. Clegg, vicprez. s-ojn F. Sutcliffe (Gateshead), R. Blackley (Bedlington), sekr. s-on J. H. Murray, prop. sekr. s-on A. R. Fairbairn, kiel jurnalagenton s-on G. Shepherd. Oni decidis okazigi la proksiman konferencon Paskan sabaton 31. marto en Darlington.

Post la afera kunsido la Federacianoj ĝuis bonegan temon kaj interbabiladon Esperantistan. La vespero estis cedita al la amuzo: s-o R. G. Redpath gajnis entuziasmajn aplaŭdojn por sia magia laboro kiel jonglito, farita tute Esperante

iom post iom foriĝis ĉiu dubo, kaj klarigis la mallumo, ni komprenis la tutan situacion kaj nin mem reciproke.

Tia entuziasma edziĝofesto ne estis festita dum multaj jaroj sur la iutlanda stepo. La ĉagrenoj kaj kontraŭaĵoj de miaj karaj bogepatroj ŝanĝigis je ĝojo kaj kvieteco, ilia vivpovo, ilia amo denove refreŝigis; la politikaj uraganoj kaj enigmoj estis forgesitaj; ilia vojaĝo nun finiĝis kaj samtempe mia rakonto.

## Dia volo.

Laŭ Richard Dehmel\*.)

*Malsatas vi feliĉon, Eva,  
timas de l' arb' deŝiri pomon,  
kiun Di' al vi malpermesis  
antaŭ tutaj kvin miljaroj,  
vi jun-kreitaĵ!*

*Ĉiuvespere mi ĝin sentas,  
kiel vi la malgrasajn manojn  
en via lito virgulina  
supren etendas al Jehovah:  
Donu ĝin al mi, donu!*

*Kompatinda pacienco!  
Ne feliĉigas timemulojn  
li, Jehovah.*

*Li donis al vi la malsaton, viajn manojn:  
Prenu kaj manĝu — kaj poste suferu!*

Esperantigia D-ro Emil Pfeffer.

\*.) Moderna germana lirikiato. — Rim. de l' Trad.

## Pensero.

*La dio de la silentado vivas per la viktimoj,  
kiujn alportas al li la parolemluloj.* *Kiuza.*

# La plialtigo de la abonprezo

por malbonvalutulo neniel estas kaŭzita per la aldono de „Revuo“ kaj „Internacia Komerc“, kiel esprimis sian opinion kelkaj abonantoj en malbonvalutaj landoj. Tio jam evidentigas el la fakto, ke ni ne plialtigis la prezojn por malbonvalutuloj. La plialtigo nur okazis por stabiligi ET-on, kiu ĝis nun ekzistis grandparte pro la favoraj por ĝi valutaj cirkonstancoj, kiuj permesis al ni konsenti eksterordinarajn prezojn por malbonvalutuloj, sed kiuj ne restos eterne.

La ĝisnunaj prezoj por malbonvalutuloj — post depreno de la rabato por la revendisto aŭ la abonejo — parte eĉ ne kovris niajn proprajn elspezojn por papero kaj afanko, tiel ke por nia laboro restis nenio. Sed estas juste, ke ankaŭ la malbonvalutuloj pagu iun minimuman prezon, kiun ni nun fiksis je 12 svisaj centimoj. Sole por kelkaj landoj ni ĝis nun ne tute atingis tiun prezon, sed ankaŭ por ili la minimuma prezo de 12 svisaj centimoj devos esti atingita ĝis somero, escepte por Ruslando, kiu provizore restas ekster konsidero pro sia tute neklara situacio.

Ni petas ankoraŭ pripensi, ke — se ET aperus ekzemple en Svislando — sole la afanko por unu numero kostus 10 centimojn; kaj estas antaŭvideble, ke ankaŭ en Germanlando, kiam la marko stabiligis, la afanko po numero altiĝos minimume ĝis 5 centimoj. Do, ne la aldono de „Revuo“ aŭ „Internacia Komerc“ devigas nin plialtigi la prezojn de ET por malbonvalutuloj (ĝi estas nur rimedo de la eldonejo por varbi pliajn abonantojn kaj anoncojn), sed la konsidero pri la daŭra ekzistopovo de la semajna Esp. ĵurnalo.

Ankoraŭ allan eraron de multaj abonantoj ni devas ĝustigi. Ili komparas ETON kun naciaj ĵurnaloj, koncerne prezon. Jen tute ne rajtigita komparo! Naciaj ĵurnaloj ekzistas ĉefe per bone pagataj anoncoj, kaj ilia abonantaro nombras je dek miloj. ET havas malpli ol 4000 abonantojn kaj nur malmultajn, malbone pagatajn anoncojn. Laŭ nia supozo, la kaŭzo de tiu ĉi eraro de la samideanoj estas, ke ili ankoraŭ ne sufiĉe kutimiĝis al sia propra ĵurnalo. La plimulto de la Esperantistoj pagus pli volonte unu frankon por monata revuo 60-paĝa ol por kvar 6-paĝaj ET-numeroj, ne pripensante, ke la eldono de monata revuo, eĉ grandamplaksa, eĉ 100-paĝa, estus por ni multe pli simpla kaj pli facila kaj multe malpli riska afero ol la eldono de regule aperanta semajna ĵurnalo. La Esperantistaro ankoraŭ ne scias sufiĉe estimi la „semajnlulon“. Jen por ni maldolĉa, kvankam ne malkuraĝiga konkludo!

kaj laŭmode, ĉar li eĉ uzis „misteran radiotelefonon“. Gejunuloj kantis kaj deklamis, sekvis dancoj kaj akrobatoj. Favoraj anoncoj pri la konferenco aperis en la lokaj ĵurnaloj, el kiuj unu enpresis ĉefartikolon (angle) pri Esperanto kaj la konferenco.

**La plej fama hungara dramo en Esperanto.**  
La gazetoj Pester Lloyd kaj Magyaraság de 28. jan. raportas, ke la Esperanto-Instituto preparas Esperantan eldonon de la plej grava hungara drama verko: „La tragedio de la homo“ de Emeriko Madach, kies verkisto naskiĝis antaŭ la milito en „La verda standardo“. La eldonon preparas D-ro Kalocsay, kaj ĝi estos grava plirliĉo de nia literaturo.

## Diversaĵoj.

### Kvara Internacia Labora Konferenco.

La raportoj kaj protokoloj pri internaciaj konferencoj aperas ĝenerale en dikaj volumoj, kiuj ne multe allogas la libramantojn. Tamen la dis-

## Kvar fabeloj de G. E. Lessing.

### 1. Herkuleso.

Kiam Herkuleso venis en la ĉielon, li salutis unue la diino Juno. La tuta ĉielo miris pri tio kaj oni demandis lin: „Kontraŭ via malamikino vi estas tiel ĝentila?“ Li respondis: „Jes, ĉar per ŝiaj persekutoj mi havis ŝancon, meriti la ĉielon!“ La Olimpo estis kontenta pri tiu ĉi respondo de la nova dio kaj la diino Juno senkoleriĝis.

### 2. Bovoviro kaj cervo.

